

ESPERANTO

TRIUMFONTO

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolescierca).

Profektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gill Norton, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabriko-
direktoro, Kaunas.

N-o 205
17. 8. 1924

Redakcio:
Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butin, L. K.

Administracio:
Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo
po numero egalvaloro de 0,06 dolaro
aŭ 0,20 sv. fl. por landoj, kies valuto
sufieris maksimume 80%^o; por ĉiuj aliaj
landoj 0,05 dol. aŭ 0,25 sv. fl.

Anonprezo
po kvadrata-centimetro egalvaloro de
0,20 sv. fl. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fl.),
en „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

La Deksesa.

Antaŭ la vojaĝo.

Mi ekspiras, spiregas. Fine, post klopodado dum kvar tagoj, mi havas la pasporton en la poŝto kun ĉiuj necesaj vizoj. Intencante viziti — post la mondkongreso en Wien — ankaŭ la postkongreson Budapeŝt kaj la sudslavan naciun kongreson, kaj ne volante reveturi laŭ la sama vojo, mi bezonas la vizojn de la konsulejoj de kvin landoj: de Aŭstrio, Hungarujo, Jugoslavio, Italujo kaj Svislando.

La unuan tagon mi perdis per havigo de „atesto pri bona konduto“, de la formularo por peto pri pasporto, de la atesto de l' financoficejo pri tio, ke mi pagis miajn impostojn, kaj de la pasporto mem. Je l' honoro de la diversaj oficejoj (loka, komunuma, distrikta kaj eĉ de la financa) mi devas konfesi, ke ĉiuj servoj min tre ĝentile kaj relative rapide, — kiam traktadon oni ĝenerale ne spertis en la pasintaj jaroj.

La duan tagon mi sukcesis ricevi la vizon de la hungara konsulejo, kies estro estis vere tre komplezema sinjoro, kaj tiun de la aŭstria.

Dum la mateno de la tria tago mi estis en la itala konsulejo kaj en la svisa pasport-oficejo; kaj hodiaŭ mi ĵus forlasis la jugoslavanan konsulejon.

Mi spiregas. La koro malpezigiĝis, kvazaŭ ŝtono defalus de ĝi. Sed ankaŭ mia monujo konsiderinde malpezigiĝis. Pli ol 70 or-markojn kostis la pasporto kun la diversaj atestoj kaj vizoj. Alkalkulante la veturkostojn por fervojoj kaj tramo, por atingi la oficejojn kaj konsulejojn, kaj la kromajn elspezojn, mi havis perdon de 100 mk., krom la tempoŝerado. Certigita alia sumo konsidere, ke mi elspezis ĝin por eta libroto, enhavanta nur kelkajn paperfoliojn, pli malpli bele enstamprintajn kaj suskribitajn.

Tamen mi ne volas plu pensi pri tiuj pasintaj tagoj. Bela vojaĝo atendas min. Novajn landojn mi vidas, novajn pejzaĝojn mi admiras, novajn homojn mi renkontos, novajn mendojn mi studos. Do, kio perdiĝis, estu ĝi perdita!

Ekbrilas pli bela suno, vokas belaj ĝojoj, atendas mi nespertitaj ĝuoj jam en plej proksima estonteco.

Ancoraŭ unu laboro: pakado de l' kofro, kaj unu plia malĝojo: la aŭdiado, — kaj la vojaĝo povos komenci.

De Köln al München.

Densa homamaso atendas sur la kajo en la ĉefa stacio de Köln la enveturado de l' ekspres-vagonaro al Bavario. Kaj kiam fine ĝi aperas, tuj la amaso sin ĵetas en la vagonojn, kaj ĉiuj ĝojas, kiu ricevis bonan sidlokon. Mi sukcesis akiri du oportunajn lokojn ĉe fenestro por mia akompanantino kaj mi.

Precipe je 5.27 h. posttagmeze, kiel montrite sur la horaro, la vagonaro ekmoviĝas. Unu minuto poste ni troviĝas jam sur la ponto super la Rejno, rezultas ankorau laston fojon la grandiozan katedralon, traveturas la antaŭurbojn Deutz kaj Kalk — kaj jen la kamparo estas atingita.

Vilaĝoj pasas antaŭ niaj okuloj, la kruza roko de Siegburg, kiu neatendite leviĝas el la ebena, nun la monaĥejo kaj preĝejo sur sia supro, aperas kaj malaperas. En la urbeto Hennef, kie ni forlasis la okupitan teritorion, estas ne tre severa kontrolo de pasporto kaj pakajo per francaj soldatoj.

Kaj nun la vagonaro dum preskaŭ du horoj traveturas la longan Sieg-valon, parte laŭborde de la ĉarma rivero, parte trans pontoj kaj tra multaj sed nelongaj tuneloj. Urbejoj, vilaĝoj kaj kasteloj sin sekvas preskaŭ seninterrompe. Interesa estas ĉi tie la karaktero de la montaro, kiu konsistas el ardezo. Tial ni ankaŭ ne miras vidente preskaŭ ĉiujn domojn tegitajn per ardezaĵaj tabuloj.

Jam ekkrepuskas, kiam la vagonaro forlasis la Sieg-valon. En Frankfurt ni alvenas je komenciĝinta nokto.

Post iom pli longa halto en la Majn-metropolo la vagonaro daŭrigas sian veturadon tra la nokto al Aschaffenburgh. De tie ĝi eniras valon de la Spessart-montaro. Iu el niaj kunkepeanoj fermis la lumĉapon por povi ripozi neĝenite de la penetrantaj lumradioj, kaj ankaŭ ekstere regas mallumo.

Subite la vagonaro ekhaltas meze sur la linio; tiriĝanta sono de sireno aŭdiĝas, kiun longedaŭra, multfoje ripetata ĥoro redonas. Sed tuj poste la lokomotivo ekiras denove, kaj nun la vagonaro komencas vere labori — ĝi devas supreniri en la montaron.

Nur post trapaso de tunelo la rapideco pli grandigiĝas; la vagonaro kuras kvazaŭ nebezona en la vaporan forton — signo, ke la plej alta punkto de la linio estas superita.

Mi rigardas tra la fenestro, sed vidas nenion. Regas nokto kaj mallumo. Naturo ripozas. Do ankaŭ mi fermas la okulojn por ripozi iomete.

La sekvantaj stacioj preterpasas preskaŭ nerimarkate. Mi ne dormas, sed mi tenas miajn okulojn fermataj, ĝis „lo“ nedifinebla devigas min malfermi ilin kaj ĵeti rigardon tra la fenestro.

Bela vidaĵo ravas min. Momente mi ne scias, ĉu mi dormas aŭ maldormas. Antaŭ mi fluas rivero, post ĝi tiriĝas longa strio de montetaro. Kaj ĉion ensorcigas la matenkrepuŝko per sia neklaŭra, duba lumo. Estas la Majn, kies bordoj ni laŭiras.

Tiu vidaĵo kaj la freŝa matenvento, kiu eniĝas tra la malfermita fenestro, baldaŭ denove vigligas la kunepearon. Ili parolas pri la bela vetero, kiun la mateno alportos, kaj sincera ĝojo montrigiĝas en ĉies mienoj. — La Majnon ni delonge forlasis. Alia regiono estas atingita.

Sed ĉi — kio? Granda lago, kiu ne estas signita sur la geografia karto!

Baldaŭ ni sciiĝas, ke tio estas rivereto Altmühl, kiun la pluvegoj de la pasintaj tagoj tiel larĝigis, kaj kiu ĉe la unua rigardo similas al lago kaj ĉe pli longa observado ŝajnas potenca riverego. Videbla la inundo de tiu ĉi rivereto kaŭzis grandan domaĝon al la kampofruktoj.

Dikaj nebuloj leviĝas al la akvomaso, foje la tuta vidaĵo dronas en ili. Sed la suno estas pli forta ol ili; ĝiaj radioj venkas la nebulfantomojn, kaj la tago fariĝas eĉ pli serena ol ni supozis.

Apud Ingolstadt ni transversas la Danubon, kaj — kvankam kun sufiĉe da malfruigo, tamen ankorau antaŭtagmeze ni atingis la metropolon de Suda Germanujo, la urbon kun la mil vindindaj aĵoj — München, kies interesa karaktero kaj klasika beleco povas konkuri eĉ kun milionurboj. Jes, ĝi estas vere interesa, tipa, bela, klasika kaj — malmultekosta.

Tiom pli mi ĝojis, ke mi povis ĝin montri al mia akompanantino, kiu ankorau tute ne konis ĝin. Bedaŭrinde la tempo estis iom mallonga, tamen eĉ la supraĵa impresio estas grandioza.

De München al Salzburg.

En München aliĝis iu konato-samideano, kaj la sekvantan tagon ni daŭrigis triope la vojaĝon al Salzburg. La veturado estis mallonga sed interesa. Ni vidis ĉarmajn urbetojn kaj vilaĝojn kun graciaj preĝejojturoj, preterpasis bajonoj de la lago Chiemsee kaj iom post iom alproksimiĝis la Alpoj.

En Salzburg ni devis — antaŭ ol eniri la urbon — pasi la landliman kontrolon. En la stacidomo akceptis nin la salzburgaj samideanoj, kaj precipe sinjoroj Grössinger kaj Vogel klopodis senlace pri ni kaj la ceteraj eksterlandaj kongresanoj, kiujn la diversaj vagonaroj elassis en la belan urbon ĉe l' rando de la Alpoj.

Ancoraŭ la saman tagon la salzburganoj, inter kiuj ni renkontis eĉ perfekte parolantajn fraŭlinojn, montris al ni la interesan arkepiskopan kastelon, la monton Mönchsberg kaj aliajn vid-

indaĵojn. Belega estas la perspektivo de la ĉefaj rondrigardaj punktoj: de ĉie oni vidas la helan urbon kun siaj preĝejoj, palacoj, hoteloj kaj loĝdomoj je ambaŭ bordoj de la atfala Salzach-rivero, kaj la gigantaj montojn de la Alpoj en la fono.

En la salminejo de Hallein.

La sekvantan tagon ni faris ekskurson al la salminejo de Hallein.

Alveninte en la urbeto per la fervojo, ni supreniris al surmonita vilaĝo Dürrenberg. De tie ni eniris la minejon, vestite per blankaj ministaj kostumoj: du gvidistoj kun lanternoj kaj sep gesperantistoj formis unu sektionon.

La gvidado tra la salminejo daŭras ĉ. unu horon. Oni devas piediri ĉ. tri kilometrojn subtere, kelkfoje oni glitas sur ligna glitvojo preskaŭ vertikale malsupren. Unu el tiuj glitvojoj (entute estas ses) havas altecon de 60, alia eĉ tian de 80 metroj.

Foje oni povus iom timi ĉe la penso, ke oni troviĝas interne de monto, precipe kiam la gvidistoj klarigas, ke la koridoroj post kelkaj jaroj fermiĝas de si mem, se ili ne estas prilaborataj de tempo al tempo.

Atingante la finon de unu el tiuj koridoroj, oni subite ekhaltas surprizite. Subtera lago etendiĝas antaŭ la mirigitaj okuloj; ĝi estas ĉirkaŭita de elektraj lampetoj, kies diversaj koloroj reflektiĝas en la senmova akvo.

Siranga sento ektuas la koron; dum momento oni ne scias, ĉu tio estas vero aŭ sonĝo. Sekrete, preskaŭ senbrue alnaĝas iu ŝtranga-forma veturilo de la alia bordo de la lago; neniun persono estas sur ĝi; ĝi ŝajnas movata de nevidebla fantomo. Ni eniras ĝin, kaj same senbrue, kiel ĝi venis, ĝi reiras trans la lagon.

La lago, kiel klarigas la gvidistoj kaj kiel ankaŭ estas legeble en la „Gvidlibro tra Salzburg“, estas interna kaverno, en kiu enkondukita akvo altiras la ŝalonoj el salhavaj ŝtonoj, ĝis ĝi estas satigita per salo kaj malsupren kondukata al la salino en la urbo Hallein.

Post la piedirado, glitado kaj veturado en la ŝtranga-forma boato oni sidigas sin sur veturilon kvazaŭ sur ŝelon kaj traveturas la lastajn du kilometrojn ĝis la elirejo ĉe l' piedo de la monto; tuj ĉi elveturado okazas je tiel timiga rapideco kaj je tiel terura bruo, ke oni ĝojas, kiam la elirejo estas atingita.

De Hallein ni faras ankorau belan promenadon tra la Salzach-valo kaj finis la tagon per rigardo de kastelo Hellbrunn kaj ties akvoludoj.

Alveno en Wien.

La vojaĝon de Salzburg tra Linz al Wien ni faris per vagonaro, kvankam oni diris al ni, ke la vojaĝo per ŝipo sur la Danubo de Linz al Wien estas eĉ pli bela ol la ŝipveturado sur la Rejno. Mi ne volas dubi pri tio, sed mi devas diri, ke la fervoja veturado laŭ la bordoj de l' Rejno certe estos pli bela ol la fervoja veturado tra la valo de l' Danubo. Do, alian fojon, kiam mi havos okazon traveturi la Danubo-valon, mi preferos la ŝipon.

En Wien mi alvenis kun kelkaj aliaj gekongresanoj mardon posttagmeze en la okcidenta stacidomo, kie ni estis afable akceptataj de wienaj samideanoj. Verdaj flagoj, steloj kaj aliaj kvazaŭ deziras al ni koran bonvenon.

Estante laĉaj kaj malsataj, ni unue vizititis la stacion restoracion por tagmanĝi, kiu havas ankorau alian avantaĝon, ĉar tie ni estis bone protektataj kontraŭ pluvego jam delonge minacinta kaj subite eksplodanta.

Entute la vetero estis tre dubinda dum la lastaj tagoj; sed ĝenerale ni havis bonŝancon, eĉ en Salzburg, kie — laŭ la famo — regas daŭra pluvovetero, tiel ke iuj spirituloj asertas, ke ĝi pli meritis la nomon Regensburg (Regen = pluvo).

Do ni ĝojis, ke ni sidis protektate en la restoracia verando, dum la ĉielo elŭtis siajn akvojn torente.

Iom nin embaras la mangokarto, kiu havas en Wien tute alian aspekton ol tiuj konatoj en Germanujo. Multaj mangajoj estas viajn specialaĵoj, kaj ni devis traduki iliajn nomojn en „germana lingvo“, kiel ankaŭ diversajn efektive fremdlingvaj anonciajn bongustiaĵojn, kion la afablaj viennaj samideanoj volonte provis laŭ sia plej bona povo. Mi bedaŭras la malfeliĉajn nermanlingvaj samideanoj, kiuj havas ankoraŭ pli grandan peŝon por mendi konvenajn mangajojn.

Kiam la pluvo ĉesis, nia unua vojo estis al la kongresejo. Ni atingis ĝin post traveturado de longa moderna strato kaj de kelkaj belaj bulvardoj, ĉi tie nomitaj „Ring“. Granda moderna konstruaĵo, ornamita per verdaj flagoj kaj aŭsoj, jam de malproksime evidentiĝas kiel ejo de nia nunjara mondkongreso.

En la kongresejo mi ricevis tuj la adreson de la hotelo, kiu la L. K. destinis por mi; sed la insigno kaj kongresdokumentoj laŭ informo estos pretaj nur morgaŭ matene.

Komplezema maljuna sed ankoraŭ fervora samideano kondukis min al la hotelo, kiu troviĝis meze en la antikva kvartalo de la urbo. Sed, ĉar mi promesis zorgi pri loĝejoj ankaŭ por kelkaj aliaj samideanoj, por kiu celo mi alvenis en Wien jam marde, kaj ĉar la pordisto de „mia“ hotelo estis homo admirinde burokrata, kun kiu mi ne povis interkompreniĝi malgraŭ la sama gepatra lingvo, mi devis serĉi alian hotelon. Por diri la veron, mi ne ĉagreniĝis pro tio, ĉar ne tre plaĉis al mi la situo de la hotelo en la antikva kvartalo, kiu estas, simile kiel en multaj aliaj urboj, malpli bone zorgata de la „urbaj patroj“ koncerne purecon kaj bonodoron ol la novaj kvartaloj. Sed mi devis eniri okon aŭ naŭon da hoteloj, antaŭ ol mi trovis konvenan: unu ne disponis pri sufiĉe da ĉambroj, alia estis tro malpura, tria tro multekosta, kvara tro malproksima, ktp.

Fine tamen mi trovis, helpate de mia akompanantino kaj de alia konato, kiu akompanis nin de München, hotelon puran, ne multekostan kaj facile atingeblan, en pli nova kvartalo.

Kiam la vespero iris sian vualon super la domaron de la urbo, ni sidis kune en la restoracio de nia hotelo, ĝojante, ke ni superis la malagrablaĵojn de la longa vojaĝo.

La antaŭtago de la kongreso. Interkonatiĝa vespero en la amuza parko de l' Pratero.

(Merkredo, 6 aŭgusto.)

Mi venis al Wien tute sen iuj iluzioj. Pro tio min ankaŭ ne povas io seniluziĝi ĉi tie.

La L. K. aranĝis la kongreson tiel sekrete kaj kaŝe, kvazaŭ ĝi estus kongreso de politikaj konspirantoj, pri kies preparoj oni ne devas rakonti al la publiko. Krome, la kongreso de Wien estas provi novan eksperimenton. Ĝia programo estas tute diferenca de la antaŭaj, ĉu prave ĉu ne, tion pruvas la sekvontaj tagoj.

Merkredo estas la granda tago de l' alveno de la plej multaj kongresanoj. Ili venas amase el ĉiuj direktoj kaj el ĉiuj landoj. Ricevi ĝustan informon pri la nombro de la reprezentataj landoj kaj de la kongresanaro entute estas neeble. Oni parolis pri 4000 anonciĝintoj; sed mi ne povas garanti pri la akurateco de tiu ĉi cifero.

Matene mi denove vizitas la kongresejon por ricevi miajn dokumentojn; sed denove oni petas min atendi — ĝis posttagmezo.

Interlime mi rigardas kun aliaj samideanoj kelkajn vidindaĵojn de Wien, kaj posttagmeze mi denove provas ricevi miajn dokumentojn. Sed jen kiel mi supozis, estas jam neeble atingi la kongresoficejon. Amaso da homoj atendas antaŭ la kongresejo. Ili atendos bone dum unu horo aŭ pli. Do mi rezignas.

Vespere mi revenas pro la interkonatiĝa vespero. Sed ĉu mi aŭdas ĝuste? Ne okazos interkonatiĝa vespero? Vere, ĝi ne okazos; la plej kore dezirita, la plej sopire atendita aranĝaĵo de ĉiu kongreso ne okazos dum la Deksesa!

Estas nekredible. Sed anstataŭe vi povos iri al kabareda prezentado; al kabareda prezentado jam la antaŭvesperon de la kongreso! Kaj la kabareda prezentado okazos ankoraŭ la morgaŭan kaj la postmorgaŭan tagon, ktp. Ĉu ne sufiĉos tiuj morgaŭa kaj postmorgaŭa tagoj? Kial oni rabas de la kongresanoj ilian ŝatatan, amatan interkonatiĝan vesperon? Zorgu ni, ke estonte tia peko kontraŭ bona, pruvita kutimo, kontraŭ la deziro de la kongresanoj ne plu okazu!

Ni volas havi nian interkonatiĝan vesperon, kiel en antaŭaj jaroj; ĝi ne bezonas esti pompa festo kun grandiozaj prezentadoj, sed tute simpla kunveno en granda salonego aŭ prefere en bela ĝardeno, kun iom da koncerto kaj kun tre mal-longa, tute senceremonia salutarolado.

Nu, kion fari? Ni sentis kvazaŭ vundon en nia koro, sed ni ne volis ĉagreniĝi jam antaŭ la komencigo de l' kongreso. Nia humoro estis, kiel oni diras en germana lingvo, „pendumila humoro“. Do, ni amuziĝu hodiaŭ, laŭte kaj senceremonie! Ni vizitu Prater-on!

Granda bruego tie! Budoj, karusejoj, artefaritaj montoj, valoj, grottoj, amuzaj fervejoj, boatoj — kaj bruo, bruego!

Ni miksas nin inter la popolamason kaj, irante de budo al budo, de karusejo al karusejo, de unu amuzilo al alia, ni estas ĝajaj kun la ĝaja vienna popolo, kiu serĉas ĉi tie forgeson de la dumtagaj klopodoj kaj zorgoj. Kaj jen — ni vidas verdajn stelojn. Do, nia areto ne estas la sola, kiu forkuris en la Prateron. Pli kaj pli multe da gekongresanoj vidigas, kaj ĉi tie — en la amuza parko de l' Pratero — ni trovas kvankam ne plenaloran sed tamen iel akcepteblan anstataŭon por la perdita interkonatiĝa vespero.

Voĉoj en la gazetaro.

La Deksesa estas por Wien granda afero kaj faros certe bonan propagandon, ne soĭe en la milionurbo mem, sed en la tuta lando Aŭstrio kaj trans ĝiaj limoj. Ĉie en la urbo, sur la stratoj, en la tramoj, en la kafejoj kaj restoracioj oni parolas pri Esperanto, kaj la aŭsoj kun sagaj kaj verda stelo, kiujn oni renkontas en multaj lokoj de la urbo kaj kiuj montras la direkton al la kongresejo, faras bonegan reklaman por Esperanto kaj estas praktika helpilo por trovi la vojon. Nur malofte mi vidis aŭsojn tiel simplan kaj samtempe tiel efikan kaj praktikan.

Sed la plej bonan propagandon eble faras la raporto, aperanta en la ĉiutaga gazeto.

„Wiener Allgemeine Zeitung“ publikigis jam la 6-an sub titolo „Bonan tagon!“ longan artikolon, el kiu mi ĉerpas la jenajn frazojn:

„Ni deziras al la ĝesinjoroj, kolektiĝintaj por la XVI-a Universala Kongreso de Esperanto en Wien, bonan tagon kaj bonan kongreson.“

Wien, depost jaroj kuŝanta flanke de la grandaj okazaĵoj, jam ne loko de gravaj konferencoj, jam ne centro por bataloj kaj kunpuŝigoj de naciaj pasioj, ĝojas esti elektita kiel interkonsilejo de paca kaj vere internacia movado.

Ankaŭ la kongresanoj baldaŭ spertos, ke ili povas esti tre kontentaj je sia elekto. Oni devas eĉ miri, ke la konscio pri la bonega taŭgeco de Wien kiel loko de internaciaj kongresoj ne estas pli ĝenerala. La distingita geografia situo de Wien apud la grandaj transeŭropaj trafikvojoj, la unikeco de tiu ĉi kunigo de grandurbo kaj turista urbo, devenanta de la situo ĉe la piedo de l' Alpoj, la rava pejzaĝa bildo de la urbo kaj de ĝia antaŭurbo, la somera beleco de ĝiaj bone prizorgataj parkoj, la pacemo kaj nacia senpasieco de ĝiaj loĝantoj — ĉi-ĉio kaj ankoraŭ multo alia devus fari Wienon serĉata kongresurbo.

Nu, ni nun havas veran, grandan, internacian kongreson kun 5000 partoprenantoj, kaj el diversaj antaŭsignoj oni povas konkludi, ke publiko kaj estraro, hotelistoj, mastroj kaj komercistoj havos la ĝustan komprenon pri la signifo de la okazaĵo.“

Fine la gazeto alvokas, ke oni kondukту plej afable, plej kore kaj gestame al la homoj kun la Esperanto-insigno.

„Illustriertes Wiener Extrablatt“ publikigis jam la 7 aŭg. ilustraĵojn pri la kongreso kaj grandan artikolon „Alsignifia kongreso en Wien“.

El raporto de „Wiener Allgemeine Zeitung“ de 7 aŭg. mi ĉerpas jenan bonan priskribon:

„Hela antaŭtagmeza sunbrilo kuŝas super la Konzerthaus, kiu estas ŝanĝita je kongresejo. Sur verdajn stelojn malsupren radias la suno, sur flagojn kaj rubandojn kaj brakumojn kaj — bedaŭrinde — ankaŭ sur la asfaltan de la strato, kiu ĝuste nun, ne tre sencoplene, estas forŝirata kaj riparata. Malbona odoro de gudro plenigas la aeron.“

Interne la kutima kongresbildo: promenantaj paroj, viglaj grupoj, senpripo vestitaj ĝentilhomoj, fraŭlinoj en helaj vestoj, angliĝoj kun okulvitroj, malhelhaŭtaj orientuloj, vivoplenaj sudlandanoj, katalogoj, prospektoj, presaĵoj, surskriboj, proklamoj, sciigoj, komunikoj, ordistoj, budoj, libroj, propandiloj, homoj rapide kaj gravmaniere paŝantaj tra la koridoroj, fervoraj vizitoj, sencesa malferrado kaj fermado de pordoj, intere malgranda improvizita Wiena Foiro, galanteriaj komercaĵoj, ludiloj, — ĝaja kaj vigla miksaĵo.“

La unua kunsido.

(Ĵaŭdo, 7 aŭgusto.)

La programo anoncis por la 7 aŭg. matene je 10 h. „internan malfermon de la kongresa laboro“.

La mezgranda salono, en kiu la „internala malfermo“ estis okazanta, baldaŭ pleniĝis.

Je 10.20 h. D-o Privat levigas kaj klarigas, ke la unuaj tri tagoj de la kongreso estas dediĉitaj al la kunsidoj de komitatoj kaj de fakasocioj, kaj ke la kunsidoj de la kongreso mem komenciĝos nur dimanĉon. Li diras, ke tiu nova aranĝo estas farata sub respondeco de la Loka Komitato. Li proponas tuj nun okazigi la ĝeneralan kunvenon de Universala Esperanto Asocio.

Post akcepto de lia propono li salutas la amikojn de UEA kaj speciale ĝian honoran membron s-inon Zamenhof, kiu ĉeestas kun sia filino. (Aplaudigo.)

Li atentigas pri la jarraporto de UEA en la kongreslibro kaj donas klarigajn rimarkojn.

Li diras, ke en la lasta tempo nia movado ŝanĝiĝis el konfuza klopodado je bona organizo, sed ke super tiu organiza fundamento ni devas konstrui fortan domon, por kio la nuna nombro de 6000 membroj de UEA ne sufiĉas.

Poste li parolas pri la buĝeto, pri servoj de delegitoj, pri la celo de UEA, pri jarlibro, gazeto, radio ktp.

Tuŝante la temon „radiotelefono“ li komunikas, ke la intereso de la esperantistaro por propra radiostacio esperantista estas granda, kaj ke la propra stacio eble jam baldaŭ efektiviĝos.

Koncerne la komitato: s-o Stettler eksigis kiel prezidanto kaj fariĝis honora prezidanto. Efektiva prezidanto fariĝis D-o Privat, vicprez. s-o Page, direktoro de C. O. s-o Jakob, la ĝisnuna ĝenerala sekretario. Nova komitatano D-o Fischer.

D-o Privat finas per la esprimo, ke ni devas esti ambiciaj, ne por ni mem sed por la asocio (UEA). Koncerne la landnoman demandon, denove jetita de Brita Esp. Asocio, D-o Privat klarigas, ke UEA volas peti, kune kun BEA, ke la Lingva Komitato, post enketoj, korespondado (kun Poŝta Unio k.a.), starigu definitivan liston de la landnomoj, kiuj ankaŭ UEA promesas akcepti.

Parolas s-oj Fischer, Isbrucker, Mangada, Kenn, Krüger kaj aliaj, parte iam larĝe kaj enluĝe, pri diversaj aferoj de UEA, precipe pri la interrilato inter la naciaj asocioj kaj UEA. Kelkaj esperantistaj oratoroj devas ankoraŭ nepe eduki sin paroli nur laŭte kaj ne rakonti cent bagatelaĵojn, kiuj bone taŭgas ĉe la biertablo sed ne por oficiala kunsido.

Je la fino de la kunsido D-o Privat deziras bonsukceson al la diversaj fakunsidoj, post kio la ĉeestantoj diras: —

Okazas hodiaŭ fakunsidoj pacifista, fervojista, blindula, komercista, poŝtoficista, katolika, studenta, bontemplana, framasona ktp. Neble viziti ilin ĉiujn! Mi petas la koncarnajn protokolitojn sendi siajn raportojn plejeble baldaŭ al la redakcio de ET por publikigo.

La vendredo.

(8 aŭgusto.)

La programo anoncas por la hodiaŭa tago pli ol dudek fakunsidojn, kaj kiel specialajn aranĝojn: lumbildparoladon pri „Maks kaj Moric“, la neforgeseblaj bubaĵaj tipoj kreitaj de la fama germana humoristo Wilhelm Busch; krome la neevleblan kabaredan prezentadon de „Vesperto“.

Mi uzas la tagon precipe por rigardi iomete pli profunde la internan organizon kaj la eksteran aranĝon de la kongreso, plue por vizito al la iama imperiestra somerrestadejo kastelo Schönbrunn.

Kion diri pri la organizo de la kongreso? Estas nedankinda afero. Laŭ tio, kion mi spertis en la antaŭaj tagoj; laŭ tio, kion mi vidis hodiaŭ; laŭ tio, kion rakontis al mi aliaj partoprenantoj; kaj laŭ mia sincera opinio mi devas diri, ke kelkaj detalajoj ja estas eĉ tre bone aranĝitaj; sed la ĝenerala impresoj estas nekontenta.

Estas necese, ke oni parolu foje tute sincere, por ke almenaŭ estonte oni lernu el la eraroj de la antaŭaj kaj precipe de la nunjara kongreso. Sajnas, ke kelkaj anoj de la Loka Komitato volis, ĉu pro neĝuste komprenata ambicio, ĉu pro alia kaŭzo, ĉion fari mem; almenaŭ mi aŭdis, ke oni rifuzis la kunhelpon de bonvoluloj, kiuj sin proponis por helpi en sia fako, same kiel mi spertis mem koncerne la ĉiutagan kongresbultenon.

Kvankam en Nürnberg ni faris malbonan sperton por nia ĉiutaga bulteno, kaj kvankam mi persone ne deziris denove preni sur min la saman laboron, ni proponis — laŭ instigo de kelkaj samideanoj — al la L. K. de Wien similan, eĉ pli ampleksan aranĝon okaze de la Deksesa.

Komence la L. K. kvazaŭ konsentis; sed kiam la afero fariĝis ŝaga kaj kiam ni skribis leteron post letero, poŝtkarton post poŝtkarto kaj eĉ telegrafs, la L. K. eksilentegadis.

Kaj subite, dum la kongreso, venas en miajn manojn la dua numero de „Kongresa Bulteno“, oficiala organo ktp.“ La unuan numeron mi ne vidis ĝis nun, ĉar ankaŭ la disvendado de la bulteno okazas tiel sekrete, kvazaŭ ĝi estus iu komandanĝera eldonaĵo.

Mi plezure konsentas, ke la L. K. prenis de mi tiun laboregon kaj mem eldonas la ĉiutagan kongresbultenon; sed ĉu ĝi ne povis almenaŭ per unu poŝtkarto sciigi nin, ke ĝi mem eldonos la bultenon kaj ke ni ne plu zorgu pri la aperigaĵo? Certe stranga kutimo, lasi la aliajn palpi en malmumo kaj flamanfere ignori ĉiujn regulojn de bona kondukta korespondado.

Jen unu afero! Mi povus nomi dek similan. Ankaŭ la afableco de kelkaj sinjoroj dekartantoj en la kongresejo estas sufiĉe negativa. Dume la ĵurnaloj petis la wienanojn rilati plejeble afable al la fremdaj esperantistoj, oni ricevis en la kongresejo de esperantistoj mem ofte tre strangan respondecon al demandoj pri informoj ktp.

Iu sinjoro volis aĉeti en la kongresa vendejo paperon por fari notojn. La respondo estis en tre neafabla tono: „Ĉu vi do ne povas legi, ke ĉi tie estas libro vendejo? Papero aĉeti en la urbo!“ Tamen poŝtkarto estis tie ricevebla. En la lando de la koncarna sinjoro estas kutimo, ke

zn vendejoj, kiuj havas poŝtkartojn, oni povas ankaŭ aĉeti paperon. Cetere estas mirige, ke en la tuta kongressejo oni ne povas aĉeti paperon.

Ankaŭ pri la funkciado de la poŝtofcicejo, leterdisdonoj kaj monŝanĝejoj en la kongresa domo oni ne povas esti kontenta. Jen ili estas fermitaj, jen mankas poŝtmalkoj resp. mono, jen la interpremigo estas tiel granda, ke oni ne povas esti servata.

Por estontaj kongresoj oni atentu, ke la diversaj oficejoj devas esti malfermitaj dum la tuta tago, minimume de 8 h. matene ĝis 7 h. vespere seninterrompe, kaj ke en ili devas deĵori sufiĉe multaj kaj sufiĉe viglaj, se eble junaj, samideanoj aŭ fraŭtinoj. Alie la kongreso ne estas ĝuo sed turmento. La ĝesamideanoj de la kongresurbo devas konscii pri sia nepra devo, dum la kongresgatoj esti je la plena dispo de siaj gastoj. Se tio ne estas ebla, oni ne rajtas inviti la Universalan Kongreson.

Oni atentu ankaŭ, ke dum ĉiu oficiala kunsido ekzistu sufiĉe da oportuna loko por la ĵurnalistoj. Dum la kunsido de UEA (ĵaŭde) la raportistoj devis stari ĉe la muro kaj starante aŭ fraŭtinoj. Oni petis antaŭ la kunsido, alporti tablon, kaj ricevis la respondo: „Atendu!“ Ni atendis bone — ĝis la fino.

Je ĉi tiu loko mi tamen ne volas forgesi danki al tiuj el la wienanoj, kiuj per sia tuta bonvolo, per sia tuta forto kaj kun multe da afableco kaj komplezemo atribuis al la pliagrabilo de la restado kaj kiuj precipe en la unuaj tagoj multe helpis la fremdajn kongresanojn. Ne ĉiu estas kulpita. Kaj nur la kulpajn mi kritikis. Tio estas memkomprenebla.

Arangĝi kongreson ne estas infanludo, tion mi scias, kaj tion scias ĉiu saĝa samideano. Sed iu plejlebla perfekteco tamen estas atingebla. Kial oni ne ĉerpas el la spertoj de la antaŭaj kongresoj? Ĉu ne estas eble eviti la erarojn, kiujn faris la aliaj pro nesperio?

Pri la eksperimento, kiun nun provas la L. K. de Wien, t. e. ke ĝi metis la solenan malferman kunsidon de la kongreso en la mezon de la arangĝoj, mi parolos poste. Hodiaŭ ankoraŭ ne estas eble, formi al si justan juĝon pri tio. Sed jam hodiaŭ oni povas diri, ke la plimulto de la kongresanoj ne ŝajnas esti kontenta pri la nova arango.

Teo Jung.

Socia Vivo.

La laboro de infanoj en Persujo.

Gravaj reformoj pri laborleĝdono estas enkondukitaj en Persujo. La persa registaro sciigis la Internacian Laboran Oficejon, ke sekve de ordono sia, la Guberniestro de Kerman eldonis la 17. Decembro 1923 dekreton konfirmanan kaj en kelkaj rilatoj pliampliksiĝintan la rimedojn jam aplikatajn por la protekto de virinoj kaj infanoj laborantaj en la tapiŝa teksindustrio. La plifraŭ rimedoj estis alprenitaj sekve de amikaj admonoj faritaj de la Internacia Labora Oficejo al la persa registaro.

La nova dekreto ordonas maksimuman laboragradon de ok horoj, minimuman agidon de ok jaroj pri knaboj kaj dek jaroj pri knabinoj, apartajn laborejojn por knaboj kaj knabinoj, kun submastrinoj por la knabinoj, malpermeson de okupado de laboristoj trafitaj de infektaj malsanoj, malpermeson de subteraj aŭ malsekaj laborejoj, la provizon de sudrigardantaj fenestroj, la arangon de la teksilo kaj de la seĝoj tiel ke ili permesu al la laboristo la plej bonan sintenadon, la ĉiumonatan higienan inspektion de la laborejoj. La efikigado de tiu regularo estas komisiita al la polica aŭtoritatoj, kaj ĉiu malobee estas punata per monpuno aŭ par mallibereco ne superanta dudek tagojn.

Informservo de la Internacia Labora Oficejo.

Kiuj estas la neokupebluloj?

Raporto de la Brita Ministerio de Laboro.

Raporto lasttempe eldonita de la Brita Ministerio de Laboro pri enketo pri la persona situacio de la pretendantoj je senlaboreca kompenco estas speciale interesa, se oni konsideras la opinion ofte esprimita, ke la senlaboruloj konsistas grandparte el „neokupebluloj“. La antaŭparolo de tiu raporto diras, ke laŭ opinio de la enketaj oficistoj, 66,5 procentoj el la viroj interviuitaj kaj 73,5 procentoj el la virinoj, estis personoj, kiuj normale estus regule okupataj, kaj ke nur 3,6 procentoj el la viroj kaj 2 procentoj el la virinoj estis „preskaŭ neokupeblaj“.

La analizo, oni aldonas, montras, ke la viroj kaj virinoj rigarditaj kiel „preskaŭ neokupeblaj“ konsistas grandmezure el maljunuloj aŭ maljunuloj. Pli ol duono el la viroj mefitaj en tiun kategorion, kaj pli ol triono el la virinoj, estis 60-jaraĵ aŭ pli, kaj granda proporcio estis trafitaj de korpa malforteco, malsaneco aŭ iu evidenta kriplajo.

Informservo de la Internacia Labora Oficejo.

Scienco.

Arkeologio.

Trovo de restajo de ŝtonepoka homo.

Proksime de Krasnojarsk (sur Jenisej, Siberio) arkeologoj Auerbach kaj Sosnovskij trovis restaĵojn de homo vivinta dum ŝtona epoko, multajn ostojn de mamutoj, bizonoj, kaj ŝtonajn kaj ostajn ilojn.

Laŭ „Krasnaja Tatarija“ Kazan. H. Frank.

Botaniko.

Cu du botanikistoj atakitaj de viando-konsumanta kreskaĵo?

El New Orleans en Usono estas raportita la jena nekredbla historio, kiun oni povus konsideri kiel eltroviton, kvankam ĝi estis disvastigita de la granda usona gazeta agentejo „Central News“. Du botanikistoj trovis sur malgranda insulo en marĉa tereno strangan kreskaĵon, similtan al palmo kaj kies trunko estis kovrita de dika griza ŝelo. Ĝi havis flavan, tre bonodorantan floradon, kaj unu el la ambaŭ botanikistoj lam estis ekprenonta ĝin, kiam li subite rimarkis, ke li estis ekkaptita de kaptiloj, kiuj kvazaŭ ringiĝis ĉirkaŭ la arbotrunko. Ili sentiĝis kiel mola karno kaj kuntrigis kiel muskoloj. Li estis suprentrita de ili al ruĝeme brilanta malfermaĵo sur la supro de la arbo. Lia kunulo per hakiĵo helpecele kuris al li, sed estis kaptite same je unu kruro. Nur post dumhoraj malfacilitaj penadoj ili sukcesis liberiĝi. Tuj post kiam unu de la kaptiloj estis dehakiita, levigis aliaj, simile al la sukcaptiloj de polipo. Dum la luktado ankaŭ leporoj kaj kunikioj alproksimiĝintaj al la kreskaĵo, estis kaptitaj kaj konsumitaj

El „Goldenes Zeitalter“, Bern, trad. A Egg, Baden.

Fiziko.

Nova eltrovo de rusa sciencisto Joffe.

Ano de Ruslanda Sciencia Akademio A. Joffe dum unu el la lastaj kunsidoj de Fizika-kemia Societo raportis, ke post longaj esploradoj li solvis la problemojn pri klarigaj kelkajn fizikajn fenomenojn. A. Joffe per eksperimentado eltrovis t. n. „kvantojn“, t. n. atomojn de la energio. La solvota problemo estis, ke laŭ hipotezo de pluraj sciencistoj ne nur la materio konsistas el la plej mikraj eroj, t. e. atomoj, sed ankaŭ la energio estas arigo de similaj atomoj. La teorio de „kvantoj“, pruvata per multaj eksperimentadoj, tamen estas serioze diskutibla, ĉar ĝi malakordigas kun pluraj aliaj teorioj, aksiome akceptitaj de fizikistoj.

Tiuj ĉi malakordoj estis la kaŭzo de sciencaj disputoj, kiun moderna fiziko ne povis definitive solvi dum lastaj 10–15 jaroj.

Nun Prof. A. Joffe eltrovinte „kvantojn“ bril-sukcese venkis ĉiujn dubencojn, okazigante efektivan perturban en fizikaj sciencoj.

En aprilo de 1924 akademiano Joffe vojaĝis eksterlandon por raportoj pri siaj eltrovoj al alilandaj sciencistoj.

N. Krassovskij, Ufa, Ruslando.

Radio-aktiveco.

Anglaj revuoj raportas pri la plej nova progreso de tiu ĉi interesoplena scienco. Sinjorino Curie, la iniciatintino konstante laboras por la evoluigo de sia doktrino. La angla profesoro s-o Ernesto Rutherford multe apogas sin en scienca aktiveco. La plej nova elpenso de M Curie kunigas Radioaktivecon kun la sukcesajoj de Radio-telefonado. Kiel ni scias, radioaktivaj substancoj, kiel ekzemple la Radiumo mem kaj la Poloniumo, konstante disfalas kaj eligas tri specojn da radiado (a, b kaj p-Radioj). Poloniumo radiadas dum 202 tagoj kaj transformiĝas je Heliumo M. Curie ebligis al ni, ke ni povu per la oreoloj aŭdi tiun ĉi procedon. Ordinara akceptilo de Radio-telegrafado estas uzata por la celo. Per lerta arango ni povas aŭskulti la sonon per telefono aŭ tuta aŭskultantaro povas aŭdi ĝin per helpo de Radio-telegrafa sonfortigilo jam aplikata ĉe Telefunken-aparatoj La tuta mekanismo baziĝas sur la karakteriza propreco de la a-Radioj (Alfa-Radioj) ke ili ŝanĝas la elektran reziston de la aero.

jozefo Major, Oldenburg.

Historio.

Nostradamus, profetante internacian helpington.

De 1505 ĝis 1566 vivis en Francujo fama, lerta, juda scienculo: Nostradamus. Li estis kortega kuracisto al la reĝo Henriko II.

Li eldonis 1588 verkon, konsistanta el 942 kvarliniaj strofoj. En tiuj versoj li profete antaŭdiris la mondokazonojn ĝis la jaro 3797. La versoj tamen estas malfacilkompreneblaj, kaŭze de tio ke N. intence malordigis ilin. En sia antaŭparolo li diris, ke plejparte la versoj rilatas al tri teruraj ve-periodoj: la unua ĉirkaŭ 1792 (la Franca revolucio); la dua je komenco de nuna jarcento kaj la tria depost 1982. La tempoj inter tiuj krizoj estos laŭ li pli kvietaj paŭzoj. Poste feliĉa mond-epoko.

El tiuj profetaĵoj oni ĝis nun rekonis plenumitaĵon en antaŭ duonparton. La aliaj apartenas al

la estonteco. Ĉi tie nur kelkajn citaĵojn: Pri Granda Britujo li diris: „La granda Neptuno estos la plej potenca dum pli ol tricenat jaroj“. Pri Turkujo: „La duonluno, tiu malsana estaĵo, ree ekvivos kaj rapide rondiĝos“. Pri Francujo: „En Francujo la respubliko revenos tri fojojn. La trian fojon pli forta kaj pli daŭra ol antaŭe; tamen ĝi maiaperos certe post sepdektri jaroj (post la dua?) Maljunulo ree regos dudek monatojn. Post li sekvas alian. Tiam oni elektos reĝon“. (Ĉi tio por ni ŝajnas tute nekredbla.) Pri la kristanaj religioj li asertas: Tiu sekto, kiu fidas al Mario, venkos tiun sekton, kiu kredas la Filon. (Ĉu la katolikismo superis la protestantismion?)

La profeto ankaŭ antaŭdiris novan kulturan lingvon en intima komunikado inter latinaj kaj orientaj popoloj. Ni jam havas ĝin: Esperanto.

David Karlsson, Godegard, Svedujo.

Statistiko.

8 mil mortigitoj ĉiutage.

La New York'a Carnegie-Instituto, celanta laŭ povo kaj eblo firmigi la internacian pacon, publikigis tre interesan statistikan respondojn je la demando: Kiu el la miloj de la lastaj 150 jaroj estis plej kruela?

El la statistiko evidentiga, ke plej kruela estis la lasta mond milito, dum kiu estis mortigitaj 12996571 homoj. do pli ol 8 mil ĉiutage, kalkulante de 1. 8. 1914—11. 11. 1918.

Pola Esperanto Servo, Bydgoszcz.

Kiom da homoj vivas sur la tero?

Laŭ plej nova statistiko oni konstatis, ke sur la tero vivas nun 1794,7 milionoj da homoj disemitaj sur areo de 149 milionoj kvadratkilometroj en ĉiuj terpartoj. Plej multe — preskaŭ miliardo, precize 997,7 milionoj — vivas en Azio. Apenaŭ la duono de la lasta nombro — nome 448,4 milionoj — kalkulas la nombro de la Eŭropaj enloĝantoj. En Ameriko troviĝas 207,7 milionoj, el kiuj estas en Nordameriko 140,7 kaj en Sudameriko 67,0 milionoj. Afriko kalkulas malpli ol Nordameriko sole, nome 152,6 milionoj. Plej malmulte loĝas en Aŭstralio kaj Polinezio nome entute nur 8,5 milionoj da homoj.

La denseco de la enloĝantaro nature estas plej granda en Eŭropo. Je kvadratkilometro oni kalkulas 45,2 loĝantojn, en Azio nur 24,4. En Ameriko la denseco kalkulas entute 4,8 homojn je kilometro (en Nordameriko 5,7, en Sudameriko 3,6). En Afriko loĝas 4,6 kaj en Aŭstralio kaj Polinezio 1 homo je klm. Konsiderante la tutan tersupraĵon kun la neloĝataj regionoj ĉe la ambaŭ polusoj, la denseco kalkulas meze 12 homojn je unu kvadratkilometro.

Pola Esp.-o Servo, Bydgoszcz.

Nombro de Novnaskitoj en Berlin.

En 1913 por ĉiu milo de enloĝantoj oni kalkulis 13,5 novnaskitojn (maksimumo), en 1923 por ĉiu milo de enloĝantoj oni kalkulis 9,4 novnaskitojn (minimumo).

Tiuj ĉi statistikaj datoj klare montras ke dume antaŭe Berlin havis pli da novnaskitoj (en proporcio) ol Paris, hodiaŭ estas reciproke. Ankaŭ se oni proporciigas la mortokazojn oni trovas reciprokajn evoluigojn de la datoj.

J. M.

Diversaĵoj.

La Sapo en Ĥinio kaj Japanujo.

La ofte citita parolo de l' fama kemiisto Justus de Liebig, ke la sapo estas la kultura rangmezurilo de popolo, estas speciale bone aplikibla rilate Ĥinion kaj Japanujon, kie la industrio pri sapfarado havas grandan ekonomian signifon. La fabrikado kaj la uzataj metodoj similas plene al la fabrikad-metodo de la eŭropaj kaj amerikaj sap-fabrikoj. Precipe la japanaj fabrikoj liveras ĉiun specojn de sapo sed speciale bonodorajn kaj la tuta amaso de toiletsapoj en Japanujo estas pli granda, ol la konsumado de la industriaĵ kaj pormastrumaj sapoj kune. La plej grandaj sapfabrikoj estas en Tokio, Osaka kaj Amagasaki. La plej multan sapon, faritan en Japanujo, foruzas la japanoj mem; oni ja scias, ke rilate korpan purecon la japano staras unuoloke inter la azianoj.

Joh. Bernhard, München.

22165 projektoj pri universala paco!

Antaŭ kelka tempo usona pacamanto Edward W. Bok estis anoncinta konkurson pri la plej praktika metodo starigi universalan pacon kaj promesis al la aŭtoro de la plej taŭga projekto premion je 100 000 dolaroj. La anoncinto ricevis 22165 respondojn, alvenintaj el 19 landoj de ĉiuj mondpartoj, precipe el la interbatalintaj ŝtatoj, ankaŭ el Estonio, Bolivio kaj Ĥinio. Kelkaj el la projektoj ampleksas grandajn manuskriptojn, la aliaj estas nur mallongaj telegramoj, enhavantajn la ĉefajn principojn de l' projekto.

La juĝantaro konsistanta el konataj ŝtatanoj kaj instruistoj, kiel Elihu Root kaj Edward M. House, jam de kelka tempo okupas sin per la studado de la ricevitaĵoj, tamen plejverŝajne ne sukcesos fini sian laboron antaŭ tenaro venonta.

R. L. Tallinn.

Kroniko.

Por servi nian legatanton per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciĝojn (sur postkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administrativaj privataj leteroj) pri ĉiuj novaĵoj el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

Ĕropo.

Polujo.

Luck. La antaŭ nelonge fondita grupo „Junularo“ kontentige evoluigita.

La nombro de ĝiaj anoj kreskas de tago al tago. Pro malriĉeco de materialoj la helpema samideano tutmonda estas petata alsendi ne necesajn por ili unuopajn numerojn de diversaj gazetoj, ĵurnaloj, libroj, propagandiloj ktp. kaj per tio plifortigi la movadon en Luck!

Resendo (laŭdezire) kun dankemeco garantiata. La adreso de l' sekretario:

J. Kaczka, Luck, ul. Jagiellonska 21, Polujo

Saarteritorio.

En idilia loko kun naturscenejo la Esperanto-Ligo Saarteritoria aranĝis la 27. 7. 24 arbaran amuzon kun teatraĵoj, kantoj kaj muzikaĵoj. La programo enhavis germanan kaj esperantan partojn. Tre ŝatata liutokantisto, s-o Kolon, malfermis per prologo „Versoj leoninaj por UEA“ de Kalocsay. Post li la prezidanto s-o Krämer faris salutarolon, speciale bonvenigante la gastojn el Kaiserslautern, Zweibrücken kaj Straßburg. Germanlingve tiam estis ludata „Das heiße Eisen“ de Hans Sachs. La lernejgulantoj, s-ino Bonaventura, f-lino Schöndorfer kaj s-o Niebling estis forte aplaudataj. Kun sama sukceso tiuj gulantotoj ludis en Esperanto ŝercan dramon „La reĝino de Saba“. S-o Meistermann prezentis gajan monologon „Solo de fluto“. Inter tiuj prezentatoj s-o Kolon ĝojigis la ĉeestantojn per esperantaj kaj germanaj kantoj, sin akompanante per liuto. La muzikan parton plenumis mandolina orkestro kvaropa. Ĉeestis pli ol cent personoj.

La 7. 9. 24 okazos en Kaiserslautern renkontigo de esperantistoj el sudokcidenta Germanlando. Tiaj kunvenoj — ĝi estas la dua en tiu ĉi jaro — estas tre ŝatataj de la Saarteritoriaj samideanoj, kiuj ĝis nun havis malmulte da kontakto persona pro la malproksimeco de la germana centro.

J. Sch.

Gvidlibro tra Zürich

Jus aperis:

20-paĝa, ilustrita, kun urboplane.
Rekomendinda por partoprenantoj de la XVI-a.

Prezo nur sv. fk. 0.40

pagebla en svissaj poŝtmarkoj aŭ i nova egalvalora respondkuponno. Por mendoj de 10 ekzempleroj sv. fk. 0.50 plus sendkostoj. Havebla ĉe

s-ino Sing,

Turnerstr. 12 Zürich 6.

Novaj tempoj.

Gazeto de la esperantista instruistaro, propagandano, pedagogion, perlaboran lernejon kaj per edukacion pason. Petu specimenon de:

M. Goldberg, Leipzig-Co.
Klemmstr. 14. Klemmstr. 14.

Ni volas pruvi, ke la esperanta lingvo taŭgas jam por efektive fari mondkomercan per ĝi. Do ni serĉas komercajn kaj teknikajn kunkolaborantojn, kiuj ensendos al ni mendojn kaj komisionojn por aĉeti kaj vendi.

Ĉi tie oni povas favore vendi nutraĵojn; tre malmultekoste aĉeti industriaĵojn. — Ni havas vere bonegajn interrilatojn kun unueklasaj fabrikanioj, kiuj liveras sub la plej favoraj kondiĉoj novajn aŭ uzitajn ferajojn, metalajojn, ĵilajn, valvojn, kranojn, terkulturan ĉiajn aliajn maŝinojn, kamparfervoilojn, ĉiajn elektran, gumajn, ŝtopajn, smiran, pentran, papiran artikolojn. Por ke nia provo sukcesu, ni petas nur seriozajn komisionojn kaj mendojn. Al peruloj ni prezentos proponetojn. Petu de ni oferton.

Metaferrum,
Warenhandels-Gesellschaft
m. b. H.
Aŭstrio, Wien IX,
Währingstr. 6.

Gazeto, kiu manku en neniu biblioteko esperantista

INFORMOJ

de Esperanto-Asocio de Estonio.

Ĉiumonate aperante, regule jam pli ol tnu jaron (ilustrita, 8-paĝa), „Informoj“ liveras al leganto nian materialon, zorgo verkatan de konataj samideanoj, pri Esperanto-societa vivo, organizaĵdemonstradoj kaj propagando, lingvaj atentigoj, adresojn ktp.

Unika pro sia pure esperanta karaktero!

Konstantaj fakoj: El la Estonia Esperanta movado, Kritiko-Bibliografio, Demandoj k. Respondoj, Faktoj por propagando, diskutoj „inter ni“ (malfermita el ĉiuj legantoj) kaj ceteraj.

Mendu specimenon, ne forgesante aldoni respondkuponon.

Abonkondiĉoj: jare 5.50 sv. fk., duonjare 2.— sv. fk., kvaronjare 1 sv. fk. aŭ la ekvivalentoj per alia mono. — Anoncoj: 1 □ cm 0,05 sv. fk.

Admin. de Esp.-Asocio de Estonio, Tallinn —: poŝtkesto 6.

Nederlandaj Esperantistoj!

Ne forgesu vian devon **aboni** la Nederlandan Esperanto-gazeton

Holanda Esperantisto.

★

Ĝi enhavas: Literaturon, Ekzercrubrikon por komencantoj kaj progresintoj, Demandaron kaj ĉiujn ajn aktualaĵojn

Petu specimenon de la Administracio:

Hazekamp 20 Zutphen.

„Esperantista Junularo“

Organo de UEA-Junularo — bela por infana literaturo — Internacia lernejo-servo. Abonprezo po numero 1/2 franko de letero por eksterlando (jare 8 n-oj).

Administracio: A. Neupert,
Wedellstr. 17 - Leizig-Möckern, GERM.

Anoncojto.

Anoncojtoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉigo, edziĝo, morto, okazaĵo, gravaj esp. kunvenoj, festoj k. s.) 50 pag. g.
Aliaj anoncojtoj, nur akceptitaj por minimume du sinsekvaĵaj enpresoj, kostas po du enpresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de 6k ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Abonantoj ĉe kiuj ni povas depreni la pagon de la abonkoto, ĝuas per propraj anoncojtoj preferan prezon de 4vln ET-numeroj. Germanojn paĝas 2.—mk., prefara prezo por postabonantoj 1.25 mk. Anoncojtoj devas alveni 12 tagojn antaŭ publikigo.

KARAJ SAMIDEANOJ. Kiu de vi sendos al mi la numerojn 7 (265) kaj 8 (264) de gazeto „Esperanto“ el j. 1922, ricevos de mi la du lastajn eldonojn de la BES-a Adresaro aŭ ion alian laŭ sia propra deziro. Molnar Jan. Praha-Devicve 509, Ĉeĥoslovakio [1]

DEVENULOJ de s-o Frederick Donner, naskiĝis Rosemarso Pressz, Pommern, la 18 de aŭgusto 1854, estas ŝercataĵoj de s-o Walter A. Donner, 1459 East 65 th St., Cleveland, Ohio, U.S.A. Miaj gepraupoj estis John Donner kaj Eleasabet (Hegger) Donner. [1]

TRE URĜAJ MONAFEROJ! Kiu s-ano prunedonas al ni 140.—mk. germ. (35.—dolarojn). Ĉi tiu sumo estas bezonata por favora aĉeto, kiu okazos en la intereso de la Esperantomovado. Repago okazos plej mallue decembron de ĉi tiu jaro aŭ per kartoj monata. Ofertojn sendu al: Prolet. Esperanto Pressedienst, Leipzig Kleinzschn, Hirzel-Str. 27 li r. [1]

GERMANAJ TURISTOJ! Du samideanoj, naturamantoj de la „Flandra Turista Unuiĝo“ deziras bicikle traveturi Reinlandon. Alveno en Köln la 31 aŭgusto; reveno tie la 7 septembro. Celo: vizito de la Reinbordoj ĝis Mainz-Frankfurt. Kiu germana samideano volas partopreni kun ni? Ni deziras korespondi pri tiu temo kun gesamideanoj de la Reinregiono; bildkartoj (bfl.) (Ni estas 25 jaraĵ.) Remi Van Eynde, Liitbreidingsstraat 134, Berchem-Antwerpen, Belgujo. [3]

ET 1920—22. Mi vendas n-ojn 1—100. Ofertojn al E. Muth-chall, Gütlerfaberigung, Senftenberg (Laus), Germanujo. [1]

Korespondeo kaj Interŝanĝo.

S-o Antonio Kohnoviĉ, str. Piekna 68-A m. 15, Warszawa-Polujo, deziras korespondi per il. PK kaj L kun la tuta mondo. [2]

S-o Guilloux Marcel, 40 avenue Besnardière, Angers, Francujo, interŝanĝas il. PK kaj PM kun ĉiuj landoj. [2]

S-o Walter Steinert, instruisto, Kirchberg i. Sa., Weststr., Germanujo, deziras korespondi pri ĉiuj demandoj kun la tuta mondo. [2]

S-o J. G. Gyenge, oficisto, Timiŝoara, str. Telegraf 27, Rumanujo, deziras interŝanĝi il. PK (bfl.) PM kaj sportofotografatojn. Ĉiam respondos. [2]

S-o Mikolaĵ Wieremicko, pocz. Snow, pow. Nieswiezki, ŝol. Tareĵki, Polujo, deziras interŝanĝi il. PK kaj papieron kun amikoj de ĉiuj landoj. Mi certe respondos ĉiun skribaĵon. [3]

S-o Paul Koerth, juna instruisto, en Miedzzychod (Warta), ul. Gorzycka 1, Polujo, deziras korespondi esperante kun la tuta mondo. [2]

S-o Vladislav Oleksin, ul. Grodecka 145, upani Rozceklwov, Polujo, deziras korespondi per il. PK, L, ĵurnaloj. Mi interŝanĝas ankaŭ PM kaj papieron. [2]

Fraŭlo deziras korespondi kun gesamideanoj ĉiulandaj per il. PK kaj L. Ĉiam respondos. Adreso: K. Leontenkov, ĵurevska 17-16, Niĵni-Novgorod. [1]

Edziĝon al sperta kaj agraba samideano 25-35 jara sendependa kaj vojaĝema, deziras konata propagandistoliteraturamanto posedanto de vivao ktp. en neŭtrala lando, por kameraada kunkolaboro kaj propagando de Esperanto. Konfidence skribu kun bildo al eldonejo de ET. [1]

100 diversaj germanaj PM 5 sv. frk. aŭ samvaloro, Afranko ekstra. Adreso: Reinh. Piffczyk, Gladbeck i. W., Höhenstr. 10, Germanujo. [5]

S-o Hugo Banningher, Grossarl (Selzburg), Aŭstrio, deziras korespondi per il. PK kun L kun la tuta gesamideanaro. [1]

F-lino Adelaide Antonellini ne plua estas en Potenza, sed en Roma 48, Viale Angello Cooperativa i, Villino. [1]

Deziras korespondi kun la tuta mondo s-o Kreskij, adreso Krjukov, Gubfo, s-o Ĥainskij el Krjukov kaj s-o L. Moskvijn, Gubkiom RKS, ĉiuj personoj en Irkutsk, Siberio, Rusujo. Ili estas 17—18 jaraĵ. [1]

S-o Antonio A. Havar, X. Madi str. 15/b l. 12, Budapest, Hungarujo, deziras korespondi per il. PK, prefere kun ekstereuropaj gesamideanoj. Krome vendas markare diversajn poŝtkartojn, leterpaperojn, Esperantatojn. Ĉiam respondos al ĉiu. [1]

S-o Georgi Cardarov, bul. Slivnica 101, Sofia, Bulgario, deziras korespondadon tutmondan nur kun mandolinaj ĝorkesiranoj. Neprer respondas. [1]

Jar. Drvota, komercisto, Domažlice, Ĉeĥoslovakio, deziras interŝanĝi PI kun ĉiuj landoj. Ĉiam certe respondos. [1]

Du amikoj, samideanoj Francisko Badura kaj Romano Smiga, ambaŭ en Stonava, Silezio (Ĉeĥoslovakio), deziras serioze korespondadi kun gesamideanoj ĉiulandaj per il. PK kaj L. [1]

S-o T. F. Tuovinen, Mikkeli, Finlando, serioza esperantisto, deziras korespondi kun astrologoj, okultistoj, framasonoj. [1]

S-o Livingstone Jenkins, 64 St. Thomas Rd, London N. 4, Anglujo, deziras korespondi kun la tuta mondo kaj interŝanĝi esp. gazetojn, propagandilojn kaj PM. Certe respondos al ĉiuj, kiuj skribas. [1]

S-ano Paul Kaiser, Traubensirn. 60, Stuttgart, Germanujo, deziras korespondi per L kaj interŝanĝi artojn il. PK kaj PM. [1]

S-o L. A. De Greef, 28 rue Hayettes, Lodelinsart, Belgujo, deziras korespondi per il. PK kaj L kaj interŝanĝi naciajn gazetojn kaj PM kun la tuta mondo. [1]

Ĉiu esperantisto, kiu interesigaas pri la politikaj problemoj de Ĕropo devas legi la aktualan libron:

La Sendangereco de Francujo

(„La Sécurité de la France“)

de s-o André Honorat,
Senatano, eksministaro de Publika Instruado en Francujo.

Jus aperinta.

Eldono honorigita de apogo de la Parisa Komercia Cambio kaj de la Respublikana Komitato de Komercio kaj Industrio.

Volumo de ĉirkaŭ 160 paĝoj kun aparta antaŭparolo de la aŭtoro.

Kolektiva

traduko kontrolita de s-o Grosjean-Maupin.

La prezo de la volumo nur 5 fr. fk. + 0.50 por sendelspezo.

Ĉefa Deponejo:

Centra Librejo Esperantista,
51, rue de Clichy, Paris 9e.

Legu la libron:

Ĉiu vera esperantisto estas idealisto kaj ĵiaj nepre devas posedati tiun ĉi libron, kiu kies enhavo la plej ideala ora epoko de la homaro estas en krepusko — ĉiam la nuna kviza stato de la mondo, kiu estos sekvaĵa de la plej bonaj kaj plej favoraj imagotaj cirkonstancoj sur la tero. Ĉiuj klarigis bazas sur la Biblio kaj ĵiaj profetaĵoj por la Regno de Dio sur la tero. — Prezo 1.25 sv. fk. aŭ 1.— or. mk. — Mendu ĉe

Garda Turo,
Biblio- kaj Traktat-Societo,
Esperanta Fakoj,
Landstr. 277.

Rieden bel Baden,
Svislando.

Poŝtĉekkontoj:
Aarau VI, 1905,
Karlsruhe 702 26.

Misionoj da homoj nun vivantaj neniom mortoj!

La plej granda marbanejo sur Adrio
Kupari apud Dubrovnik (Ragusa)

400 m sabla marbordo - 220 elegantaj ĉambroj
Bonega kuirejo
Ĉiutagaj koncertoj - Amuzoj - Sporto

Propraĵo de
Dubrovacko Kupalisno i Hotelso D. D.
(Dubrovnika Baneja kaj Hotela Akcia Societo).